# JEU DE L'OIE

## FABLE « la cigale et la fourmi »

### Cikado kaj formiko

Kantis dum somer' sen fin'
Cikadin'.
Kiam frosta vento blovis
Sen provizo ŝin ektrovis,
Sen malgranda eĉ pecet'
Da muŝeto aŭ vermet';
La malsato pelis ŝin
Al najbara formikin'.
Kaj ŝi petis kun insisto:
"Donu grajnojn por ekzisto
Ĝis la nova jar-sezon'.
Mi vin pagos, laŭ ordon',
En Aŭgust', pro best-honor',
La procenton kun valor'."
Ke ne pekas formikino
Per pruntemo, estas vere;
"Kion faris vi somere?"
Diris ŝi al pruntulino.
"Tage, nokte al venantoj,
Ne mallaŭdu kantis mi."
"Kantis?  gaja jen meti'!
Nun ekdancu post la kantoj!"

*Grabowski, Antoni*